


Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

Kongreslibro
73-a Hispana kaj 18-a Andaluzia
Kongresoj de Esperanto



Arundo, 1-a / 4-a de majo
2014

SALUTO DE LA PREZIDANTO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Karaj amikoj kaj kunkongresanoj:

Bonvenon nome de Hispana Esperanto-Federacio al tiu ĉi 73-a Hispana Kongreso de Esperanto. Ni esperas ke vi ĝuos la gastamon de la urbo kiu tiel malferme nin bonvenigas.

Arundo/Ronda estas speciala urbo. La situo kaj la pejzaĝo impresas ĉiujn vizitantojn kiuj unuafoje ĝin vizitas, kaj poste la arĥitekturo kaj la historio onin ravas. Evidentas do kial HEF akceptis entuziasme la proponon okazigi tie ĉi nian tradician renkonton. Ni tre dankas la urbon kaj la urbestaron pri la gastamo kaj la bonvolemo, kiujn ili montris al ni.

Ni ankaŭ deziris profiti la kulturen heredaĵon de la urbo kaj la regiono. Jen kial oni elektis kiel moton de nia kongreso “Flamenco kaj Esperanto”. Esperanto kreiĝis kiel ponto de kulturo inter la homoj de la mondo, kaj tiu ĉi povas fariĝi bela okazo por transdoni la senton de la plej tradicia artformo de Andaluzio, la plej internacie konata muzikĝenro hispania. Ni esperas ke la vizitantoj venantaj el aliaj landoj kaj regionoj ricevos pli profundan kontakton kun la artaj trajtoj de tiu ĉi teritorio, kiuj ofte estas ricevataj tro supraĵe. Arundo riveligis sendube la ideala loko por montri la valoron de tiu ĉi kulturo.

Krome, en Andaluzio, ni spertas la bonŝancon kalkuli je tre valoraj samideanoj, kiuj sendube sukcesos krei amikan etoson por ĉiuj vizitantoj. Ni santempe gastas Andaluzan Kongreson, jam la 18-an laŭnumere, kaj espereble tiu ĉi estos okazo ankaŭ plifirmigi nian

movadon en la plej ampleksa regiono de la lando, kaj unu el tiuj kun trajtoj plej specialaj.

Fine, ni deziras speciale danki, la esperantistojn de Arundo, kiuj tiel amike nin gastigas. Ĝi estas tre juneca kaj tre entuziasma rondo, kaj ni multe esperas pri la estonto de nia lingvo tie ĉi. Ni ankaŭ fidu ke la nomo de Arundo flugos al ĉiuj lokoj kie troviĝas parolantoj de nia lingvo, kaj ke ni tiel povos firmigi la internacian famon de la urbo kaj la regiono.

Mi certas ke je la fino de nia vizito, plifirmiĝos la esperantecon de Arundo, kaj, eĉ pli grave, naskiĝos flamenkeco kaj eĉ “arundeco” en niaj koroj. Krom la esperebla memoro pri la feliĉe pasigitaj momentoj inter amikoj, tiu ĉi sento por ĉiam restu ĉe ni post la Kongreso.

José Antonio del Barrio,
prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio



SALUTO DE LA PREZIDANTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

ŝ

aluton al ĉiuj kaj bonvenon nome de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Mi deziras al la ĉeestantaro feliĉan restadon en la belega urbo Arundo, kiu fariĝos Esperantio dum tri neforgeseblaj tagoj. Nia celo estas, ke vi ĝuos la belecon kaj interesan historion de unu el la plej belaj urboj de Andaluzio. Mi certas ke ĉiuj, precipe eksterlandanoj, tre ĝuos niajn kutimojn kaj nian bonan karakteron. Ankaŭ mi certas ke vi tre ŝatos la bongustajn kaj malmultekostajn manĝojn, kaj la ekskurson al la antikva Arundo, iam nomita *Acinipo*, kaj la bongustan vinon de la urbeto *Setenil*, kiun ni ankaŭ vizitos, kaj nian specialan kanton, nome Flamenko:

Fluas energio,
sonas melodio
kaj melankolio
sur ligna scenejo,
kun gaja atmosfero
kaj mirakla kanto
kaj art-danc-klakado
de bela knabino,
kaj la vorto *ole*
de la ĉeestantaro
ĝuanta la gravan eventon.
Tio, kara amiko,
nomiĝas flamenko.



Ĝuu la du kongresojn en Arundo-esperantujo.

Ángel Arquillos López
prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo



73 Hispana Kongreso
de Esperanto
kaj 18-a Andaluzia Kongreso
okazontaj en Arundo (Ronda)

de la 1-a ĝis la 4-a
de majo 2014

andaluziaesperanto.blogspot.com

LA SUDO ANKAŬ EKZISTAS

Verdire, Andaluzio ne troviĝas sur la zono de la tipa iberlanda Esperanto-Movado, tio estas: Madrido-Zaragoza-Valencio-Barcelono. Ni diru, ke ni troviĝas ĉe iaspeca movada periferio kaj sendube, temus pri duobla periferio, se ni konsideras kiel la centron de la E-Movado tiujn landojn de Centra Eŭropo.

Tamen, la sudo ankaŭ ekzistas. Ni ne forgesu, ke la unua urbo kie ekzistis Esperanto-grupo en Hispanio estis Malago, ke ĉi tie ankaŭ oni eldonis la unuan lernolibron de esperanto por hispanlingvanoj, kvankam ne oficiale aprobata de Zamenhof mem, kaj ke la movado floris dum la dua kaj tria jardeko de la pasinta jarcento. Tamen, malgraŭ ĉi ĉio ni ja periferias rilate la movadon.



Geesperantistoj en Granado 2012

Sed, kiel dirite, *la sudo ankaŭ ekzistas*, kaj pro tio, ĉi-jare Andaluzia Esperanto-Unuiĝo invitis ĉiujn geesperantistojn de Hispanio kongresi en Arundo, unu el la plej belaj urboj en Andaluzio.

Malgraŭ la granda areo de nia andaluzia lando kaj la malmultaj rimedoj de nia asocio, ni, ekde antaŭ tridek jaroj, laboras por la disvastigo de la internacia lingvo en Andaluzio. Ni ne ĉesas organizi

kursojn, eldoni revuojn, aperigi librojn de tempo al tempo, bonvenigi eksterlandanojn kiuj vizitas Andaluzion, organizi renkontiĝojn... kaj nia ĉefa celo estas faciligi la laborojn de la ekzistantaj lokaj grupoj de esperanto en Andaluzio, inter ili ankaŭ tiu juna grupo de Arundo, kaj oferi al ĉiuj interesitoj en nia lando la eblecon lerni ĉi tiun mirindan kaj utilan lingvon.



Geesperantistoj en Kordovo 2008

Tamen, ĉi-foje nia deziro estas alia. Hodiaŭ ne temas pri la organizado de kongreso kie la ĉeesto de kvindeko da gesamideanoj jam estus grandega sukceso. Ĝuste nun, ni deziras plie, ni decidis organizi kongreson kaj ni invitis ĉeesti ne nur al hispanaj gesamideanoj, ni pensis grandskale kaj ni sopiris ankaŭ la ĉeeston de niaj portugalaj kaj nordafrikaj najbaroj. Ĉu nur temas pri revo? Ni jam vidos ĉu ni sukcesis aŭ ne. Sed, la aliĝo de pli ol cent homoj, kelkaj el ili eksterlandanoj, havigis al ni grandajn esperojn sukcesi.

Kaj kial en Arundo? Aliaj urboj, kiel Malago, Sevilo aŭ Kordovo estas pli facile atingeblaj de homoj venantaj de foraj lokoj. Tamen Arundo ... estas Arundo. La germana poeto Rainer Maria RILKE skribis antaŭ cent jaroj... *Arundo, revata urbo*... Do, se ekzistas en Andaluzio magia kaj rava urbo, tiu estas Arundo. Krome, ni troviĝas ĉe ne tro granda urbo, do la ĉeesto de cento da geesperantistoj estos eĉ pli vidata.

La Loka Kongresa Komitato pripensis la organizadon de multaj programeroj, ni esperas, ke ni estos sufiĉe fortaj por ĉeesti ĉiujn: prelegoj, koncertoj, ekskursoj, kurso..., kaj ĉiuj ili tre altkvalitaj. *Flamenco kaj Esperanto* estas la moto de ĉi tiu Kongreso. Sed, ĉu estas eble miksigi ambaŭ aferoj? Kaj la flamenko kaj esperanto estas manieroj esprimi niajn sentojn kiuj estas komprenataj de la tuta mondo. Nek esperanto, nek flamenko konas landlimojn, pro la fakto, ke ne estas eble limigi ion naskiĝantan ĉe la homa animo, do, la neceso esprimi la sentojn de popolo, foje eĉ tragikaj sentoj, kaj la neceso komuniki kun ĉiuj fajfas pri landlimoj. Esperanto ne estas nur lingvo, same kiel flamenko ne estas nur kantado, ambaŭ estas iloj pere de kiuj homoj povas libere esprimi sin.

Ĉar la nordo de Afriko troviĝas nur je kelkaj centoj da kilometroj, eĉ distance pli proksime ol urboj kiel Madrido, Barcelono aŭ Bilbao, ni deziris ankaŭ dediĉi kelkajn programerojn al esperanto-parolantoj de tiu zono. Sed, ĉu ekzistas organizata E-movado en Maroko, Alĝerio aŭ Tunizio? La respondo devus esti *ne, ĝuste nun ne...* ĉu estontece? *Eble*. Se io naskiĝas ĉe la esperanto-movado post la okazigo de ĉi tiu kongreso, krom neforgeseblaj bonaj momentoj, tio devus esti la kontaktojn por helpi la disvastigo de la internacia lingvo en la nordo de Afriko.



Geesperantistoj en Sevilo 2011

Pro tio, ni faciligis la ĉeeston de nordafrikaj geesperantistoj, espereble ĉiuj ili povos veni. Ĉi tiel, ni ankaŭ montrós al la tutmonda samideanaro, ke esperanto ne estas lingvo ekzistanta nur sur la centro de Eŭropo, ĉar *la sudo ankaŭ ekzistas*.

Do, jen la kialoj por kongresi en Andaluzio kaj en Arundo. Kompreneble ĉiuj streboj cele la organizadon de partopreninda kongreso estus senutilaj se la kongresanoj ne partoprenas, do, pro tio ni invitas al vi senti hejme. Ne hezitu proponi aferojn se tio povas helpi la organizadon de bona kongreso, sed komprenu ankaŭ, ke ni ne estas profesiuloj rilate la organizadon de renkotiĝoj, tio estas: komprenu niajn limojn, sed malgraŭ ili, ni deziris organizi kongreson kie Vi sentos komforta.

Ĝuu Andaluzion kaj Arundon; parolu la internacian lingvon; sentu la flamenkan arton kaj helpu la disvastigon de la movado nordafrike, ĉar ĉi tiuj estas la celoj de la jena Kongreso de Esperanto.

La Loka Kongresa Komitato

Membroj de la Loka Kongresa Komitato

En Arundo:

Juan Diego Díaz Bautista
Fátima Jiménez García

En Malago:

Ángel Arquillos López
Carlos González Spinola
Karmela San Segundo Cordero
Mariló Torres Mateo

En Kordovo:

José María Rodríguez Hernández

KONGRESEJOJ

- Monaĥejo “Santo Domingo” kiu utilas kiel “Kongres-Palaco de Arundo.” Tuj apud la famega *Nova Ponto*.

La Katolikaj Gereĝoj ordonis starigi ĉi tiun monaĥejon por la dominikana ordino en la jaro 1485. De antaŭ kelkaj jaroj, post rekonstruo ĝi utilas kiel kongresejo de Arundo. Ĉiuj prelegoj okazos ĉi tie, same la al-andalusaj muzikaj koncertoj, okazonta ĉe la ĉefa klostro de la konstruaĵo.



- Flamenka Rondo de Arundo Str. Artesanos

Ĉi tie okazos la flamenka spektaklo, la pop-muzika koncerto de María Villalón kaj tiu de JoMo. Okazos ĉi tie ankaŭ la oficiala kongresa bankedo.



- Municipa Teatro “Vicente Espinel” Str. Alameda del Tajo

Ĉi tie okazos la programero “Vivu la Teatro”, kompreneble, ĉu ne?



PROGRAMO


de la 73-a Hispana kaj 18-a Andaluzia Kongresoj de ESPERANTO



9:30	Ekde ĉi tiu horo akceptado de la gekongresanoj kaj disdonado de materialoj.
10:30	Ne-solena malfermo de la Kongresoj.
11:30	Interkona mateno kaj promenado tra la urbo Arundo.

14:00

Libera tempo

16:00	Prezentado de la libro <i>Poezio: Armilo ŝargita per futuro</i> kaj prelego de la aŭtoro Miguel FERNÁNDEZ pri la temo “Esperantigitaj voĉoj de andaluzaj poetoj	Laborkunsido pri rilato al amaskomunikiloj (Ricardo BIURRÚN kaj José Antonio del BARRIO)	Kurso de Esperanto 
-------	---	--	---

17:00	Prezentado de la libro <i>Eŭropo, paŝon post paŝo</i> kaj prelego de la aŭtorino Rafaela URUEÑA	Laborkunsido pri Fundación de Esperanto (Lorenzo NOGUERO kaj Manuel PANCORBO)	Kurso de Esperanto 
17:50	Prelego “Kiam la Sudo rigardas Norden” de Rikardo F. ALBERT REYNA 	Laborkunsido pri pri Laborplano de UEA (Carlos SPINOLA kaj José María RODRÍGUEZ)	Kurso de Esperanto 
18:40 19:30	Prelego “Esperanto, komuna lingvo por Eŭropo, Projekto TUJ” de Therry Saladin 		Kurso De Esperanto 
20:00 22:30	<p style="text-align: center;">FLAMENKA NOKTO ĉe la Flamenka Rondo de Arundo Kantistoj: Paco Pereña, Miguel Laín, Ríos Cabrillana, Antonio Sanlúcar, El Mollina. Gitaristoj: Agustín de la Fuente kaj Miguel Laín. Dancistino: Virgina Peña “La Chabuca”</p>		

Dum la tuta tago:

- * Akceptado kaj disdonado de dokumentoj
- * Libro-Servo



Programero de la Konferenco pri Instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la Mondo.









Programero de la sekcio “Esperanto en Nord-Afriko”.



9:00	Laborkunsido pri instruado de Esperanto (Eduardo BERDOR) 	Laborkunsido pri Bitoteko kaj informadikaj projektoj, kaj eldonado de libroj kaj bitlibroj (Ana MONERO, Juan TRENADO kaj José Antonio del BARRIO) 	Kurso de Esperanto 
10:00	Solena malfermo de la Kongresoj kun Kvaropo Sinkopo kaj Komuna Foto		
11:15	Prezentado de la libro <i>Mediteraneaj Eroj II</i> de Ángel ARQUILLOS kaj deklamado de kelkaj poemoj	Laborkunsido pri junulara movado	Informado pri Esperanto al ne-esperantistoj
11:45	Prelego de Viktoro SOLÉ, "Mansignado por Esperanto" 		
12:30	Prelego pri la lingvoj de Afriko de Francisco Javier MOLEÓN 	Ĝenerala provludo por Vivu la Teatro (nur por la ludantoj)	Prelego por mezlernantoj kiuj vizitas la Kongreson 
13:00	Prelego de Enric BARBERA Esperanto kaj socio: pruvitaj ideoj funkciantaj"		

14:15

Libera tempo

16:00	Prelego pri la franca lingvo, kiel lingvo de la koloniantoj kaj de la sendependenco en la nordo de Afriko, de Eduardo BERDOR 	Prelego de José María SALGUERO, "Vikipedio" 	Kurso de Esperanto 
17:00	Nord-Afrika Programero (ĉefrolas nordafrikaj esperantistoj) 		Kurso de Esperanto por mezlernantoj kiuj vizitas la Kongreson 
18:00	Prelego de Katalin KOVATS, "Oficiala Instruado de Esperanto" 		
19:15 20:30	Koncerto pri al-andalusa muziko de la bando "Turat Al-Andalus" 		

20:30 Libera tempo

22:30 (Eksterprogramo) Koncerto de Pablo CARRASCAL, en Drinks&Co.

Dum la tuta tago:

- * Eksterprogramo: Renkontiĝo kun mezlernantoj
- * Akceptado kaj disdonado de dokumentoj
- * Libro-Servo








Programero de la Konferenco pri Instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la Mondo.



Programero de la sekcio "Esperanto en Nord-Afriko".



9:00	Duontaga ekskurso Propono 1-a: Acinipo kaj Setenil de las Bodegas Propono 2-a: Turisma vizito al Arundo Propono 3-a Vizito kaj vingustumado ĉe la vin-keleto <i>Descalzos Viejos.</i>			Oficialaj KER- Ekzamenoj Niveletoj: B1 – B2 kaj C1 
14:00	Kongresa bankedo ĉe la Flamenka Rondo			
16:30	Laborkunsido pri kreado de videoj (Miguel Gutiérrez Adúriz) 	Prelego de Félix Manuel JIMÉNEZ pri Sociala kaj Solidara Ekonomio: Lastaj tendencoj en Hispanio	Fulmo -bando	Oficialaj KER- Ekzamen oĵ Niveletoj: B1 – B2 kaj C1 

17:00	Ronda Tablo pri Instruado de Esperanto 	Oficialaj KER- Ekzamenoj Niveletoj: B1 – B2 kaj C1 
18:30	Vivu la Teatro III, ĉe la urba Teatro kun deklamado de poemoj, teatraĵoj, monologoj, kantoj, humuro, ktp. gvidata de Miguel FERNÁNDEZ kaj Ana MANERO	

20:30 Libera tempo

22:00 24:00	Koncerto de la esperanta kantisto kaj muzikisto JOMO kaj de María VILLALÓN (fama kantaŭtorino el Arundo kiu kantas en la hispana kaj en Esperanto) en la Flamenka Rondo ("Peña Flamenca")
----------------	--

Dum la tago:

- * Akceptado kaj disdonado de dokumentoj
- * Libro-Servo



Programero de la Konferenco pri Instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la
Mondo.



10:00	Ĝenerala Kunsido de Hispana Esperanto-Federacio	Kurseto pri salso de Raúl SALINAS
11:00		Libera tempo
12:00	Eksterordinara Ĝenerala Kunsido de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo	
13:00	Solena Fermo de la Kongresoj	

Dum la mateno:

* Libro-Servo



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

73a Hispana kaj 18a Andaluzia Kongresoj de

ESPERANTO



ILUSTRACIONEJ DE PABLO GALI, GUERRA

1a - 4a MAJO
1 - 4 MAYO

esperanto.es andaluzio.org
andaluciaesperando.blogspot.com lernu.net



2014
ARUNDO
RONDA

73 Congreso Español y
18 Congreso Andaluz de Esperanto



Esperanto kaj Flamenko
Esperanto y Flamenco

LIBROJ PREZENTOTAJ DUM LA KONGRESO



POEZIO: ARMILO ŜARGITA PER FUTURO

de Miguel FERNÁNDEZ

La fama poemo de Gabriel Celaya inspiras la titolon de ĉi tiu verko de Miguel Fernández (Granado, 1950). Temas pri antologio de kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia poezio, enhavanta 182 poemojn de 35 aŭtoroj, tradukitaj de Miguel Fernández kun granda poezia sento.

Sur la libro aperas poemoj de la plej elstaraj poetoj de la kastil-

lingva literaturo de la 20-a jarcento, inter ili multaj apartenantaj al la Generacio de la jaro 1927: Federico García Lorca, Rafael Alberti, Dámaso Alonso, Vicente Aleixandre, Emilio Prados, Manuel Altolaguirre, Jorge Guillén kaj Carmen Conde. Ankaŭ aperas poemoj de postaj poetoj, kiel Miguel Hernández, Pedro Garfías kaj León Felipe, kune kun verkistoj universale konataj kiel Pablo Neruda. Miguel Fernández ankaŭ aperigis poemojn de aŭtoroj kiuj verkis siajn poemojn dum la frankisma diktaduro, kiel Gabriel Celaya, Blas de Otero, Ángel González, José Agustín Goytisolo aŭ Jaime Gil de Biedma kaj de aliaj nuntempaj kiel Marcos Ana, José Antonio Labordeta, José Luis Sampedro kaj Chicho Sánchez Ferlosio.


Miguel Fernández parolas en ĉi tiu verko pri la sociaj movadoj, pri la kontraŭ-frankisma lukto, pri la movado 15-M en Madrido kaj ĝenerale pri la engaĝiĝinta kastil-lingva literaturo.

La libron eldonis la asocio “Maldekstro kaj Esperanto” (SAT-en-Hispanio) kaj ĝi estis prezentita dum la pasinta SAT Kongreso en Madrido 2013. Miguel Fernández estas unu el la plej gravaj poetoj en esperanto. Li estas membro de la tiel nomata *Ibera Skolo* kaj li jam tradukis verkaĵojn de García Lorca “Sanga Nupto” (1998), “La Domo de Bernarda Alba” (1987) kaj antologion de poemoj de Miguel Hernández “Miguel Hernández, poeto de l’popolo” (1988).

Miguel Fernández ĉeestos nian kongreson por prezenti la libron kaj poste prelegi pri la temo “Esperantigitaj voĉoj de andaluzaj poetoj”. Ĉi tiu programero okazos ĵaude je la 16:00 horo ĉe la kongresejo.



Miguel Fernández



MEDITERANEAJ EROJ II ***Poemaro***

de Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

Okaze de la pasinta Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granada, novembro 2012, Ángel Arquillos prezentis sian unuan kolekton de poemoj sub la titolo *Mediterraneaj Eroj*. Dum ĉi tiuj du lastaj jaroj nia malaga samideano daŭrigis sian verkadon kaj jen la dua volumo de la poemaro.

Pere de ĉi tiu libro la aŭtoro emas diskonigi siajn sentojn pere de mallongaj poemoj. Temas pri viveroj, preĝoj, timoj, nostalgioj, tristoj, simplaj pensoj lanĉitaj en la venton pere de kurtaj linioj kie ne ekzistas ununura motivo, sed tute diversaj: amo, pasio, timoj, espero, fiaskoj... Kiel skribis Roland Platteau en la antaŭparolo de la libro << *Amo kaj morto saturas ĉi tiujn poemojn, foje mezlongajn, foje trafe, medale neforgeseble mallongajn...*>>

La libron eldonis Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj ene de ĝi antaŭparolis Roland Platteau kaj José María Rodríguez.

La prezento de la libro, kune kun la publika deklamado de kelkaj poemoj okazos vendrede je la 11:15 horo ĉe la kongresejo.



EŬROPA UNIO, PAŜON POST PAŜO

de Rafaela URUEÑA ÁLVAREZ

Mankas en la esperantlingva literatura altnivelaj eseoj pri juraj kaj politikaj temoj, tamen ekzistas profesiuloj kiuj fakas pri ĉi tiuj temoj ene de la E-movado. Unu el la plej gravaj fakuloj pri juraj temoj en nia movado estas la hispana D-ino Rafaela Urueña. Ŝi estis prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio kaj nuntempe estras Esperantan Juran

Asocion, la faka organizo kie renkontiĝas la juristoj parolantaj la zamenhofan lingvon.

D-ino Urueña instruis dum multaj jaroj en la Universitato de Valladolid (Hispanio), kie li specialiĝis pri Marjuro, Spacjuro kaj Protektado de la Medio, ŝi verkis multajn artikolojn en fakaj revuoj kaj la libron “La protektado de la Marmedio en Hispanio”. Nuntempe ŝi laboras ene de la Katedro “Jean Monnet” pri Eŭrop-Komunuma Juro ĉe la Universitato de Valladolid kaj ŝi estas membro de la Instituto pri Eŭropaj Studoj de tiu Universitato.

Kvankam ĉiuj scias pri la ekzisto de la Eŭropa Unio, kaj eĉ pri ĝia graveco en la socia vivo de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj, verdire ne ĉiuj konas ĝian strukturon. La Eŭropa Komisio, la Komisio de la Eŭropa Unio, la

Parlamento, la Eŭropa Tribunalo estas tiel gravaj en niaj vivoj kiel niaj naciaj parlamentoj kaj registaroj, tamen tiuj ne estas sufiĉe konataj.

Sur la libro la aŭtorino ne nur realigas historian vojon tra la vivo de Eŭropa Unio, ekde ĝia komenco en la jaro 1952, ŝi ankaŭ informas, eĉ tre detale, pri ĉiuj instancoj, agencoj kaj gravuloj de tiu superŝtata organizo. D-ino Urueña estas profesoro, kaj tio videblas en la teksto, tiel, la libro ne nur temas pri Eŭropa Unio ĝi ankaŭ utilas kiel tekstolibro por kompreni kio estas kaj estis la eŭropaj komunumoj. Verdire ĉi tiu verkaĵo estas unu el tiuj fakaj libroj pri kiuj bezonas la esperantolingvo.

Sean O'Riain, irlanda diplomatiisto kaj konata esperantisto, verkis la antaŭparolon de la libro.

D-ino Rafaela Urueña ĉeestos la Kongreson por prezenti la libron kaj poste prelegi pri eŭropunia temo. Ĉi tiu programero okazos merkrede la 1-a de majo je la 17:00 horo ĉe la kongresejo.



D-ino Rafaela Urueña

PRELEGOJ OKAZONTAJ DUM LA KONGRESO



16:00

ESPERANTIGITAJ VOĈOJ DE ANDALUZAJ POETOJ de Miguel FERNÁNDEZ

Vidu resumon kaj konu pri la preleganto sur la paĝo 21-a.

17:00

EŬROPA UNIO de Rafaela URUEÑA

Vidu resumon kaj konu pri la prelegantino sur la paĝo 24-a.

17:50

KIAM LA SUDO RIGARDAS NORDEN de Rikardo F. ALBERT REYNA


Hispanio estas la norda najbaro de sia suda najbaro, Maroko. Ilia najbareco havas *trajtojn de interligiteco kaj de konkureco*. Tiuj trajtoj efikas sur la respektivaj manieroj, kiel ili rigardas unu al la alia.

Surbaze de enketo farita en Maroko kaj publikigita en 2005 de du marokaj esploristoj, la ĉefaj traktataj punktoj estas jenaj:

- 1) Kiel multe la marokano *konas Hispanion*;
- 2) Kion ili opinias pri la *instituciaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj de Hispanio* en la lastaj jardekoj;
- 3) kiel estas vidataj la *rilatoj inter ambaŭ landoj*;
- 4) kaj *kion atendas la marokanoj* por la kunlaboro inter la du landoj kaj por la eblecoj de ties plibonigo.

La *rezultoj* de tiuj esploroj rimarkigas, ke *restas longa vojo*, se oni volas plibonigi la respektivajn bildojn ĉe sia najbaro. Tamen ekzistas esperiga elemento en tio, ke du trionoj en la enketitaj marokanoj, malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, *ŝatus konstrui* kun Hispanio *komunan estonton kaj amikecan rilaton* en la kadro de privilegia kunlaboro, kiu alportu avantaĝojn al ambaŭ popoloj kiel garantion de stabileco, paco kaj prospero en la tuta regiono.

La preleganto



RIKARDO FELIPE ALBERT REYNA (Malago, 1962), loĝis en tiu urbo ĝis la jaro 1983 kaj ekde tiam en Madrido. Li studis en la universitatoj de Malago, Madrido kaj ankaŭ en du arabaj universitatoj de Maroko kaj Egiptio. Li doktoriĝis pri Arabaj kaj Islamaj Studoj en 2004 per disertacio pri temo rilata al la intelekta historio de islamo, poste aperinta libroforme kiel *Humanismo Islámico. Una antropología de las Epístolas de los Hermanos de la Pureza*. Regule redaktas aŭ publikigas en diversaj lingvoj (angla, araba, esperanto, franca, kastilia, kataluna)

informojn, tradukojn, artikolojn kaj recenzoj pri arabaj, islamaj kaj interkulturaj temoj. Li estas profesoro en la Aŭtonoma Universitato de

Madrido, kie li instruas araban lingvon, historion de la araba kaj islama mondo kaj historio de la religioj en Azio kaj Afriko.

Li eklernis esperanton en Malago en la jaro 1977 dank'al kursoj organizataj en tiu urbo de Eleuterio Moreno. Li ĉeestis hispanajn kaj andaluziajn kongresoj kaj eĉ volontulis ĉe la Centra Oficejo de UEA. Li ofte kunlaboras en esperantaj publikaĵoj kaj ankaŭ verkis poemojn, ekzemple "Poemoj el mia triciklo" en *Beletra Almanako 14* (junio 2012). Li ankaŭ publikigis recenzojn kaj aliajn artikolojn.

18:40

ESPERANTO, KOMUNA LINGVO POR EŬROPO. PROJEKTO TUJ.

de Thierry Saladin

Ĉu en tiu 21-a komenciĝanta jarcento, denove junul-revo ne povus skui la Esperanto-movadon por disvastigi en lamensojn tutmondskale, aŭ almenaŭ Eŭrope, la neceson de Esperanto?

La preleganto

Thierry Saladin, 59-jara, kuracisto en Montpeliero (Francio).



11:45

MANSIGNADO POR ESPERANTO

de Viktoro SOLÉ

Temas pri nova helpilo por la lernado/instruado de Esperanto.

La preleganto



Viktoro SOLÉ naskiĝis en Barcelono, li esperantiĝis en 2007. Li estas instruisto pri harmonio en *Conservatori del Liceu* de Barcelono kaj skriptisto-kunrepresentanto de la radia programo *Guia d'orquestra* en la radiostacio *Catalunya Musica*. De 2012 li instruas esperanton al komencanta grupo en Barcelono, kaj de 2011 li regule

Publikigas artikolon sub la rubriko "*La Blaga Blogo*" en la revuo KONTAKTO.

12:30

LINGVOJ DE AFRIKO

de Francisco Javier MOLEÓN

En Afriko oni parolas proksimume 2.000 lingvojn, kvankam verdire estas malfacile aserti kio estas lingvo aŭ dialekto. Ĉe la nordo de la

kontinento, la araba lingvo estas parolata de milionoj da homoj, ĉe la sub-sahara afriko pleje gravas la svahila lingvo.

La preleganto



Francisco Javier MOLEÓN GARCÍA estas konata hispana esperantisto. Li ofte verkas artikolojn en revuoj, li estas tradukanto de la esperanto-versio de *Le Monde Diplomatique* kaj dum multaj jaroj li estis oficisto ĉe la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio. Li ankaŭ estis profesoro pri la

svahila lingvo en germana universitato kaj li verkis kelkajn librojn pri ĉi tiu afrika lingvo.

13:00

ESPERANTO KAJ SOCIO: PRUVITAJ IDEOJ FUNKCIANTAJ

de Enric BALTASAR



La preleganto

Enric BALTASAR estas juna valenciano, li fondis esperanto-grupon en sia urbo *Oliva* kaj aranĝis valencian renkontiĝon en la jaro 2013. Li ŝatas sociajn sciencojn kaj laboras por sociaj ŝanĝoj.

16:00

LA FRANCA LINGVO, KIEL LINGVO DE LA KOLONIANTOJ KAJ DE LA SENDEPENDENCO EN LA NORDO DE AFRIKO

de Eduardo Berdor

Pro la fakto, ke la ĉi-jara Kongreso okazas relative proksime de tiu parto de la mondo, li prelegos pri la franca lingvo en Nord-Afriko.

La preleganto

33-jara instruisto de la franca lingvo el Zaragozo. Lia plej frua kontakto kun Esperanto okazis kiam li iel hazarde trovis dulingvan vortareton en librovendejo en sia tiama urbeto. Sed la definitivan paŝon markis



doktoriĝa lernofako kiun li sekvis en Soria. Kvankam lerni la lingvon ne estis deviga, tiu emo vekiĝis en li. Lia unua E-kongreso estis la HK de Cuenca en 2008. Li jam prelegis en la lasta Hispana Kongreso pri la pola komponisto Ŝopeno. Pianon oni luprenis por ludi kelkajn el ties valsojn, ĉar aŭskulti ilin valoris multe pli ol la klarigado. Li estas licenciulo en Tradukado kaj Interpretado sed li ĝis nun laboris multe pli en edukado.


16:00

VIKIPEDIO

de José María SALGUERO

Ekigita en la jaro 2001, la projekto “Vikipedio” temas pri libera interreta enciklopedio eldonita dank’al milionoj da kunlaborantoj tra la tuta mondo. Entute oni eldonas ĝin en 284 lingvoj, inter ili ankaŭ en esperanto. La esperantlingva vikipedio posedas preskaŭ 200.000 artikolojn, uzas ĝin 29.000 homoj en la tuta mondo kaj kunlaboras konstate kun la projekto 130 verkantoj de artikoloj.

La preleganto



Pli konata kiel *Kani*, José María Salguero estas instruisto pri hispana lingvo kaj literaturo en mezlernejo kie plutenas grupeton de libervolaj lernantoj de Esperanto. Li esperantiĝis en 1998 dum la Universala Kongreso de Montpeliero, ekde tiam foje vizitas la UKojn danke al Paŝporta Servo. Dum tri lernojaroj li partoprenis en

mezlerneja interŝanĝo kun lernejoj de Portugalio, Pollando kaj Italio danke al subvencioj de Eŭropa Unio, krom aliaj kontaktoj kun lernejoj de aliaj landoj, kiuj ne atingis koncernajn subvenciojn kaj sekve ne okazis. Krome li estas membro de Liberacana Frakcio de SAT kaj aktiva vikipediisto ekde antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj.

Ekster Esperantujo li doktoriĝis per tezo pri Ramón J. Sender kaj membris dum ĉirkaŭ 20 jaroj en teatra grupo. Krome li amatore interesiĝas pri tro diversaj fakoj kiaj ornitologio, filatelio, historio, ktp.

18:00

OFICIALA INSTRUADO DE ESPERANTO

de Katalin Kovats

Vidu branĉon “*Konferenco pri instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la mondo*”.

La prelegantino

Katalin Kováts (antaŭe Katalin Smidéliusz) estas hungara matematikisto, lingvisto, metodologo kaj esperantisto, loĝanta en Nederlando. Ŝi havis postenon en la hungara universitatranga katedro de aplikata lingvistiko, kie inter aliaj ankaŭ interlingvistiko estas la baza studobjekto por estontaj lingvistoj. En ŝia doktoriĝa disertacio ŝi analizis la propedeŭtikan valoron de Esperanto.

Siajn spertojn ŝi aktive uzas en la plibonigo de la Esperanto-instruado. Ŝi gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj metodikajn seminariojn dise en la mondo kaj nuntempe ŝi okupiĝas pri la redaktado de la porinstruista ttt-ejo edukado.net. Ŝi estas kunlaboranto de la gazeto MONATO kaj ekde 1994 vicredaktoro de Internacia Pedagogia Revuo. En la jaro 2010 ŝi post enketo de la revuo La Ondo de Esperanto elektiĝis Esperantisto de la Jaro.



16:30

SOCIALA KAJ SOLIDARA EKONOMIO: LASTAJ TENDENCOJ EN HISPANIO

de Félix Manuel JIMÉNEZ

Oni povas difini la socialan kaj solidaran ekonomion kiel tiun, kiu metas la homon en la centron de la ekonomia kaj socia disvolvado. La solidareco en ekonomio baziĝas sur projekto samtempe ekonomia, politika kaj sociala, kiu sekvigas novan manieron fari politikon kaj starigi homajn rilatojn surbaze de interkonsento kaj de civitana agado. Ni komentos kaj la lastajn tendencojn de ĝi en Hispanio kaj la rilaton kun la nuna socia movado.

La preleganto



Felix Manuel JIMÉNEZ LOBO naskiĝis en Madrido en 1969. Li studis Biologion kaj Kulturan Antropologion. Li eklaboris kiel naturmedia teknikisto kaj en la jaro 1998 li komencis sian intereson kun la “tria sektoro”, unue kiel voluntulo en asocio por disvolviĝa kunlaboro en Afriko (Ekvatora Gvineo) kaj poste kiel profesia administranto en labor-

Kooperativo en kiu nuntempe li estas labor-partnero. Li spertas pri Koroporacia Sociala Respondenco kaj Socialaj Bilancoj kaj li estas

sociala konsilanto de *Coop57* (financa kooperativo) kaj *Mercado Social de Madrid* (Madrida Sociala Merkato), kaj ankaŭ estas asesoro de la *EBC-Economía del Bien Común*. Li ankaŭ agadas ĉe la sociala movado *15M*, ĉefe en la asembleo de sia loĝ-kvartalo *Usera* en Madrido. Rilate al Esperanto, li esperantiĝis en la jaro 1997, li estas membro de Madrida E-Liceo, UEA kaj SAT kaj Sekretario de HEF ekde 2008.



ARUNDO

La urbo de niaj kongresoj

Arundo estas la esperantigita formo de la oficiala nomo de la urbo Ronda. Temas pri vilaĝo en la provinco Malago, ĝuste sur la nordorienta parto de la provinco kaj meze de Andaluzio.

La originoj de la urbo troviĝas sur la kelta civilizacio, tiel, dum la 6-a jarcento a.K. lokiĝis en la zono kelkaj setlejoj sub la nomo Arunda. La fenicoj fondis apudan vilaĝeton *Acinipo* kaj post la greka konkero la vilaĝo nomiĝis Runda.



Romia Teatro en Acinipo, apud Arundo

Okaze de la dua milito kontraŭ Kartago, la romia ĝeneralo Scipiono starigis la kastelon *Laurus*, ĉi tiu afero favorigis la alvenon de novaj enloĝantoj ĉirkaŭ tiu milita romia setlejo. Julio Cezaro donis al Arundo la kategorion *urbon*, tiel la enloĝantoj de la romia Arundo kaj tiuj de la apuda Acinipo estis konsiderataj romianoj. Dum la 5-a jarcento p.K. la suevoj okupis ambaŭ urbojn, kvankam iom-post-iom la enloĝantoj de la najbara Acinipo forlasis la urbon.

Post la alveno de la islamanoj en la Iberan Duoninsulon en la jaro 711, la berbera Zaide Ben Kesadi El Sebseki okupis, senlukte, la urbon kiu ricevis la nomon *Izn-Rand-Onda* (la urbo de la kastelo). Arundo estis

tiam la urbestro de la provinco *Takurunna* apartenanta al la Kordova Kalifejo.

Post la malapero de la kordova centra povo la urbo fariĝis sendependa regno-tajfo sub la nomo *Banu Ifren*, kies unua reĝo estis Abu Nur Hilala Ben Abi Qurra. En la jaro 1485 la reĝo Ferdinando konkderis la urbon post longa sieĝo.



Nova Ponto

En la jaro 1572 fondiĝis la Arundo Nobela Rajd-Sociento, kun la celo trejni la junajn nobelojn por la defendo de la reĝlando. Dum tiuj jaroj definitive formiĝis la urbo kiel ni konas nuntempe. La antikva arba urbo estis konsiderata kiel “la urbo”, la nova kvartalo Sankta Spirito kiel la “Alta Kvartalo” kaj Sankta Mikaelo kiel la “Malalta Kvartalo”. Novaj kvartaloj kiel Sankta Francisko kaj *Mercadillo* ĝuis grandan konstruevoluon per la kreo de restadejoj, preĝejoj, monaĥejoj, ktp.

Dum la 18-a jarcento stariĝis la Nova Ponto, kiu nuntempe estas la plej konata bildo de la urbo, kune kun la taŭro-ludejo, unu el la plej antikvaj kaj monumentaj en la mondo, kies arkitekto estis Martín de Aldehuela.

Dum la napoleona invado de Hispanio, Arundo suferis gravajn damaĝojn. La francaj trupoj detruis la romian kastelon, kiu poste estis la araba alkazabo. Krome ili detruis multajn muelejojn, kio ruinigis la zonon. Multaj arundanoj kaŝiĝis ĉe la montaro por lukti kontraŭ la

francaj trupoj, naskiĝis tiam la mito de la bandolieroj.

Post la franca retiriĝo, la bandolieroj daŭris sian agadon en la montaro, iel ili prirabis la diliĝencojn kaj la vojaĝantojn kiuj vojaĝis el Madrido en Andaluzion, krome, ili kontrabandis produktojn el la brita kolonio Ĝibraltaro. Romantikaj verkistoj, kiel Washington Irving, Prosper Mérimée, kaj Gustave Doré, inspiriĝis de ĉi tiuj rakontoj por siaj verkoj kaj desegnaĵoj.



Bandoliero, desegnita de
la franca Gustave Doré

Komence de la 20-a jarcento grava ekonomia afero impulsis la vivon de la urbo, naskiĝis tiam la Arunda Ŝparkaso, la plej grava en Andaluzio, kio vigligis la urbon. En la kultura kaj politika vidpunkto Arundo ankaŭ ludis specialan rolon komence de la pasinta jarcento, tiel en la jaro 1918 renkontiĝis en la urbo politikaj reprezentantoj de la tuta Andaluzio, kiuj aprobis definitive la andaluziajn himnon kaj standardon.

Post la hispana civila milito Arundo suferis, kiel ĉiuj andaluziaj vilaĝoj, profundan krizon, kio devigis multajn arundanojn elmigri en Eŭropon aŭ en industriajn regionojn de Hispanio.


La nova demokratia reĝimo en Hispanio, 1978, dividis la ŝtaton laŭ nova komunuma strukturo. Andaluzio fariĝis aŭtonoma komunumo, tamen unuamomente oni decidis oficiale nenion rilate la eblan ĉefurbon de la komunumo. Por eviti disputojn inter la urboj Sevilo, Granado, Malago kaj Kordovo, politika partio proponis Arundon kiel ĉefurbon de Andaluzio, kvankam poste Sevilo estus tiel nomumita.

Vidindaj Monumentoj de la urbo

ARUNDO

Nova Ponto

Sendube ĝi estas la simbolo de la urbo kaj la ĉefa turisma allogaĵo. Oni starigis ĝin en la 18-a jarcento, temas pri ŝtona ponto kun tri pordaj arkoj super la rivero Gvadalevino. Ĝi ebligas trapasi la konatan *Tajo* (la tranĉo) je 120 metroj alte. La nova ponto dividas la urbon, unuflanke troviĝas la antikva araba kvartalo (la urbo) kaj aliflanke la novan parton (*el mercadillo*). La konstruaj laboroj daŭris de la jaro 1751 ĝis 1802 kaj la ĉefa arkitekto estis José Martín de Aldehuela (1729-1802).



Taŭroludejo

Laŭdire, ĝi estas la plej antikva monumenta taŭroludejo en la mondo. La urbo Arundo estas konsiderata kiel unu el la luliloj de la moderna taŭroludado, kiu komenciĝis en la 18-a jarcento. La taŭroludejo apartenas al la Arunda Nobela Rajd-Societo kiu, pro la furoro de ĉi tiu

spektaklo dum tiuj jaroj decidis starigi grandan taŭroludejon. La konstruado daŭris ses jarojn kaj en la jaro 1785 la tiutempaj famegaj taŭroludistoj, Pedro Romero kaj Pepe-Hillo, inaŭguris la arenon. La diametro de la taŭroludejo mezuras 66 metrojn, ĝi estas konsiderata kiel la plej ampleksa en la mondo. La arkitekto estis Martín de Aldehuela, tiu kiu ankaŭ konstruis la novan ponton de Arundo. Iamaniere la taŭroludejo memorigas la rondan korton de la fama palaco de Karlo la 5-a en la granada Alhambro.



Preĝejo *Santa María la Mayor*

La reĝo Ferdinando la Katolika ordonis starigi kristanan preĝejon sur la iama moskeo de la urbo. La moskeon oni konstruis dum la 13-a jarcento kaj ankoraŭ oni konservas restaĵoj de la mihrabo. La preĝejon oni ekkonstruis tuj post la konkero de la urbo fare de la kastiliaj trupoj en la jaro 1486.

La konstruado daŭris du jarcentojn kaj pro tio aperas du arkitektaj stiloj malsimilaj laŭ la diversaj konstruaj etapoj.



La Domo de la Maŭra Reĝo

Konstruaĵo ĉe la historia kvartalo de la urbo. Temas pri domo kun neregula dezajno kiel labirinto, sur la fasado stariĝas du malsimilaj turoj. Ene de la domo abundas ŝtuparoj, eĉ estas eble decendi en la fundon de la mondama *tajo* de Arundo ĝis 60 metroj. Ĉe la fronta parto de la domo troviĝas la *tajo* mem, kaj sur la posta parto la franca arkitekto Jean-Claude Nicolas Forestier konstruis belegan ĝardenon.



Blazono de Arundo



Esperanto en Arundo

La ekzisto de esperanto-movado en Arundo ŝuldiĝas al la streboj de du junaj geesperantistoj de la urbo, Fátima Jiménez kaj Juan Diego Díaz, kiuj ankaŭ estas las ĉefaj respondeculoj de la kongresoj kiujn ni ĝuos dum ĉi tiuj tagoj.



Fátima organizis, kunlabore kun la loka urbodomo, elementan kurson de la internacia lingvo en la jaro 2006. Dum la postaj jaroj, tiun kurson ŝi denove organizis, kune kun perfektigaj sesioj por tiuj kiuj finis la elementan nivelon. En la jaro 2008, Marie Quilly, franca kin-reĝisorino, filimis en Arundon la kurta-daŭran filomon *Cent*, tute en esperanto, kie nia samideanino Fátima eĉ

deĵoris kiel aktorino. La filmon oni prezentis en la Kin-Festivalo de Antekero (Malago). Ekde la jaro 2010 la kursoj de esperanto, daŭre instruataj de Fátima Jiménez, okazas kunlabore kun la kultura asocio *Babá*, en kies sidejo okazas la instruado. Fátima neniam ĉesas propagandi la lingvon, tiel ŝi partoprenis en lokaj televid-programoj, prelegoj, ktp, kie ŝi ĉiam diskonigas la ekziston de la kursoj de esperanto en Arundo.



Juan Diego sekvis studojn pri Esperantologio kaj Interlingvistiko en la pola universitato de Poznan kaj dum la lastaj jaroj li interesiĝis kaj laboris por la organizado de junulara esperanto-movado en Andaluzio, dank'al kio naskiĝis AJEU (*Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo*), kun la celo renkontigi

ĉiujn junajn parolantojn de la internacia lingvo en Andaluzio, unuamamente pere de interreto kaj se eble, organizi estontece agadojn en Andaluzio.

Dank'al la agadoj de Fátima kaj Juan Diego ankaŭ ekzistas Arunda Esperanto-Klubo.

Vizitu ĝian blogon ĉe <http://esperantoarunda.blogspot.com.es/>



Arunda Esperanto-Klubo
Club de Esperanto de Ronda



Andaluza Junulara Esperanto-Unuiĝo
Asociación Juvenil Andaluza de Esperanto

MUZIKO DUM LA KONGRESOJ



Je la 20:00 horo ĉe la Flamenka Rondo de Arundo flamenka spektaklo.

Kantistoj:

PACO PEREÑA “El Rondeño”

Arunda kantisto, ofta kantisto ĉe la Flamenka Rondo de Arundo, kaj konataj pro siaj majstraj ludadoj de la kanto-stiloj *cartageneras*, fandangoj, *cantiñas* kaj alegrioj.

ANTONIO SANLÚCAR

La kadiza vilaĝo Sanlúcar de Barrameda estas la naskiĝ-urbo de grandaj flamenkaj artistoj, Esteban de Sanlúcar, Manolo Sanlúcar... kaj ĉiuj ili aldonis al sia nomo tiun de sia vilaĝo. Antonio Pizarro Navarro, konata kiel Antonio Sanlúcar, ludos flamenkajn kantojn ankaŭ tiunokte.

Gitaristoj:

AGUSTÍN DE LA FUENTE

Jereza gitarludisto, li ofte ludas ĉe flamenkaj festivaloj kaj li ankaŭ partoprenis en festivalo organizata de la Andaluza Centro de

Dokumentado de Flamenco por memori alian gravan flamenkan gitarludiston, Esteban Sanlúcar.

MIGUEL LAÍN “Gitanillo de Ronda”

Li ne nur gitarludos, sed ankaŭ kantos. Kvankam li estas juna artisto li jam instruis diversloke pri la flamenka gitaro.

Dancistino:

VIRGINIA PEREÑA “La Chabuca”

Malgraŭ ŝia juna aĝo ĉi tiu arunda dancistino jam estas konata por la imponeco de sia dancado kaj ĉefe pro sia esprim-kapablo kiam ŝi pied-klakadas.





Je la 19:15 horo koncerto pri al-andalusa muziko de la bando “Turat Al-Andalus”

Turat-Al-Andalus estas hispan-maroka bando ludanta al-andalusan kaj araban muzikon. Formas la bandon muzikistojn de Hispanio kaj Maroko kiuj naskigis la grupon en la jaro 2006 kun la celo memori la mezepokan muzikon de ambaŭ flankojn de la Mediteranea Maro.

Omar Benlamlih estas la solisto kaj li ludas ankaŭ perkutilojn. Li naskiĝis en Kasablanca, ĉe familio de sufiuj muzikistoj kaj kantistoj. Je sia 12-vivo-jaro li eklernis muzikon en la Muzik-Lernejo de sia naskiĝ-urbo kaj 16-jaraĝa li ekludis muzikon okaze de sufiuj renkontiĝoj. Li loĝas en Granado kie li ludas diverstipan muzikon, ne nur al-andalusa, sed ankaŭ flamenka kaj ĵazo.



Abdessalam Naiti estas la majstro de la *nej* kaj la *kanun*, tipaj arabaj muzikiloj. Li naskiĝis en Tanĝero kaj li estas muzikisto tutmonde konata. Li kunlaboris kun flamenkaj kantistoj, kiel

Juan Peña “*El Lebrijano*” kaj ankaŭ aliaj konataj muzikistoj kiel la itala Franco Battiato.



Abdessalam Naiti

Youssef el Mezghildi naskiĝis en Tetuano. Li sekvis studojn pri muziko al-andalusa, araba kaj klasika en la muzik-lernejo de sia urbo dum 10 jaroj, kie li poste estus profesoro. Li ludas *kanun* kaj liuton. Li ludis dum kelkaj jaroj en Usono. En Hispanio li kunlaboris kun la flamenkaj kantistoj José Marcé, Lole y Manuel, *El Lebrijano* kaj aliaj



Youssef el Mezghildi



Je la 22:00 horo koncerto de María Villalón.

MARÍA VILLALÓN estas kantistino kaj komponistino naskiĝinta en Arundo. Ŝi atingis la unuan premion en la televido-programo *Factor X*.

Nur 14-jaraĝa aperis ŝia unua disko *Entre Sueños* (Inter revoj) kaj nur du jarojn poste la dua, *Rompe* (Rompu). Ŝi sekvis muzikajn studojn de violonĉelo kaj en la Universitato ŝi atingis la licencion en hispana filologio.



Kiel dirite, ŝia plej grava triumfo okazis en la jaro 2007 en la televid-ĉeno “Cuatro”, kiam ŝi venis en la muzik-konkurso *Factor X*. Okaze de la kongresoj de esperanto María Villalón ludos siajn plejn gravajn kaj konatajn kantojn, inter ili “*La lluvia*” (Pluvvo). Jen la teksto de tiu kantaĵo en la traduko de Miguel Gutiérrez Adúriz.

LA PLUVO

Pluvas

la trotuaroj malsekaj estas
neniu spuro sur ili restas
la pluvo nian sekreton tenas.

Pluvas

ĉe la fenestro mi vin sopiras
la tagoj fremdas kaj min korŝiras
malvarma tempo brakumas min.

La pluvo falas sur la tegmentojn
kie sidis nin intime
kaj endormiĝis sen duboj, sentime,
sine de aŭror'.

Ĉ-hore la trinkejoj ne deĵoras
Sur min la pluvo serene ploras
ĉar vi estas for
sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas
kaj la vundoj min damaĝas
se mi ne plu aŭdas vin.

Pluvas

kaj ĉiuj vortoj fariĝas nulo
dum en la noktoj min hantas dubo
pri la destino de tiuj kisoj.

Pluvas

silento ŝvebas en la kvartalo
la suno strebas tra nuboj-baro
por plensekigo de trotuaro
por plensekigo de la tegmento

kie sidis ni intime,
kaj endormiĝis sen duboj, sentime,
sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras
sur min la pluvo serene ploras
ĉar vi estas for
sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas
kaj la vundoj min damaĝas
se mi ne plu aŭdas vin.

Sur la tegmentoj kie sidis ni intime,
kaj endormiĝis sen duboj, sentime,
sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras
sur min la pluvo serene ploras
ĉar vi estas for
sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas
kaj la vundoj min damaĝas
se mi ne plu aŭdas vin.

Se mi ne plu aŭdas vin.



Je la 21:00 horo koncerto de JoMo



JoMo estas la artista nomo de Jean Marc Leclercq, franca kantisto kaj esperantisto. Li ekmuzikis en la jaro 1977 kaj esperantiĝis en 1988. Li estis kantisto de la grupo *Rosemary's Babies* kiu eldonis du Kdojn kaj koncertis en la tuta Eŭropo kaj eĉ en Ĉinio.

Post disiĝo de la grupo li kreis alian novan, *Liberacanoj*, kun kiu li surbendigis ĉe la esperantista

Kompanio Vinilkosmo. Li kreis unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kantoj en 22 lingvoj), tio eĉ aperis en la Guinness-libro de rekordoj. Poste kaj sole, li surbendigis tutan esperantan albumon titolitan *JoMo Friponas* (2010). En la jaro 2006 aperis *JoMo slavumas*, disko kun multaj muzikistoj slavstilaj.

JoMo ofte koncertas esperante kaj multlingve, sola kun gitaro, kantante ĝojajn kaj dancigajn kantojn.



Flamenco

Flamenco estas muzika stilo, ankaŭ danca, kiu naskiĝis en Andaluzio. Multaj studoj aperis pri kiamaniere aŭ kiu estis la pioniroj de ĉi tiu arto. Laŭdire, temas pri cigana kant-stilo, tamen cigano troviĝas tra la tuta mondo, ĉefe en Centr-Eŭropo, sed la flamenka arto nur ekzistas ĉi tie en Andaluzio. Do, ni vidu kion oni diris pri la origino kaj la deveno la vorto *flamenco*.



FAMBA DE GITANOS, cuadro por J. Rosales

Kelkaj esploristoj asertas, ke ĝi devenas de la vorto “flamenco” (flandro), tio estas, ano de la centr-eŭropa regiono Flandrio. Laŭ Demófilo, patro de la poetoj Antonio kaj Manuel Machado, kaj la unua kiu pristudis serioze la flamenkon, tiamaniere oni nomumis la ciganojn en Andaluzio, ĉar ili estis nek maŭroj, nek kastilianoj. La popola tradicio nur konis la maŭrojn, la kastilianojn kaj centr-eŭropanojn, ĉi tiuj lastaj *flandroj*, pro tio la ciganoj, nek maŭroj, nek kastilianoj *sendube* devus esti *flandroj*, tio estas “*flamencos*”. George Borrow en sia libro *Los Zincali: los gitanos de España* de la jaro 1841 ankaŭ

asertis, ke la ciganoj estis konataj en Andaluzio kiel “*flamencos*”, tio estas: flandroj.

Blas Infante, patro de la andaluzia patrujo, ankaŭ studis la aferon. Laŭ li, la moriskoj kiuj ne kristaniĝis komence de la 16-a jarcento devis fuĝi. Do, ili kuniĝis al alia popolo ankaŭ persekutata kaj marĝenata, kvankam akceptata: la ciganoj. Tiuj moriskoj, konataj kiel *fellah min gueir ard* (kamparanoj sen tero), integriĝis al la cigana popolo kaj ilian kanto-stilon asimilis la ciganoj. Nenia pruvo pravigas ĉi tiun teorion, tamen oni devas agnoski, ke la flamenka kantado estas multe pli simila al tiu de la moriskoj ol al tiu de la ciganoj mem.

Alia esploristo pri la flamenka arto, Pastro García Barrios, sekvas ĉi tiun teorion, laŭ li la vorto devenus de *fellah-mangu*, kiu en la arba signifas “kanto de la kamparanoj”. Do, verdire, la persekutataj moriskoj povis kaŝiĝi inter la cigana popolo kaj ĉi tiuj adoptis ilian kanto-stilon. Kiel dirite, la flamenka kantado neniel rilatas al la kantado kaj dancado de aliaj ciganaj popoloj, kiel tiuj de Centr-Eŭropo, sed al tiu de la islamanoj.



Festo de moriskoj
en la 16-a jarcento

Do, ĉu ekzistas simileco inter la andaluzia muziko kaj flamenko? Ne, tute ne. Andaluzia muziko kaj dancado devenas de la kastilia konkero de la lando. Tiel, ekzistas *fandangoj* kaj en Andaluzio kaj en Kastilio; la *verdiales*, tipa malaga dancado kaj kantaĵo, ne estas flamenko; kaj aliaj stiloj, kiel *vito* aŭ *sevillanas* ankaŭ ne estas pure flamenka arto. Do, oni povas aserti, ke la flamenko estas moriska-cigana kanto-stilo

kiu de antaŭ kelkaj jarcentoj kunloĝis kun aliaj muzikoj en Andaluzio kaj kompreneble, ambaŭ intermiksiĝis, sed la flamenko ne estas esence andaluzia, sed cigana arto, cigana kaj moriska. Ni vidu, ekzemple, ke dum multaj jarcentoj, verdire ĝis antaŭ kelkaj jardekoj, la flamenka kantado estis esence minoritara arto, pli aŭ malpli disvastigita.

Iomete pri historio.

En la jaro 1783 la reĝo Karolo la 3-a promulgis leĝon por reguli la socian situacion de la ciganoj en Hispanio. Temis pri tre grava avero, ĉar ĝis tiam la ciganoj estis persekutataj, vere dank'al tiu leĝo la socia afero de la ciganoj ne solviĝis definitive, tamen, almenaŭ, pliboniĝis.

Post la napoleona invado de Hispanio aperas nacia konscio en Hispanio, fronte al tiuj kiuj admiris la francan liberecan kulturon apertis tiuj kiuj sentis rasan fierecon, jen fronte al la francumitaj intelektuloj troviĝis la popol-tradiciuloj. Krome, la unuaj romantikaj vojaĝantoj, ĉefe britaj kaj francaj, elstaris la ciganan kaj la andaluzian popolon kiel tiu pleje hispana. Do, la flamenka arto estis internacie ekkonata.



La unuaj eŭropaj romantikaj vojaĝantoj en Hispanio elstaris Andaluzion kiel la animon de ĉio hispaneca.

Kiam George Borrow vizitis Andaluzion en la jaro 1850 li skribis pri flamenkaj familiaj spektakloj en la grotoj de *Sacromonte* en Granado kaj en Triano en Sevilo. Ankaŭ estis tre konata la flamenka arto en Jerezo. En la jaro 1842 malfermiĝis la unua “flamenka kanto-trinkejo” en Sevilo, temis pri noktaj salonoj kie oni okazigis flamenkajn spektaklojn, kvankam ili ne estis tre rekomendindaj lokoj por la ĝenerala publiko, ĉar ene de ĝi kutime okazis akraj disputoj.

Sed, dank'al ĉi tiuj ejoj ne-ciganoj eklernis kanti kaj danci flamenk-stile. Silverio Franconetti, ital-devena sevilano, estis la plej fama ne-cigana flamenka kantisto, li malfermis sian propran flamenkan kanto-trinkejon en la jaro 1881, okazis tie “kanto-luktoj” inter la plej famaj flamenkaj kantistoj de tiu epoko, ĉar Franconetti ŝatis verti la ceterajn kantistojn antaŭ la publiko de sia trinkejo. Naskiĝis tiam la unuaj profesiaj flamenkaj kantistoj, tio estas, la flamenka arto eliris el la privataj ciganaĵoj kaj kampadejoj.



Silverio Franconetti (1823-1889) la unua profesia flamenka kantisto

Fine de la 19-a jarcento kaj fare de la hispanaj intelektuloj aperis kultura rifuzo kontraŭ ĉio kio povis aspekti hispaneska, inter tiuj aferoj la taŭroludadoj kaj la flamenka arto. Oni eĉ diris, ke ĉi tiuj estis la origino de la malboneco en Hispanio, pro la fakto, ke en Eŭropo ekzistis nek la taŭroludado nek la flamenko kaj ĉiuj eŭropaj ŝtatoj estis

kulture kaj socie pli progresemaj ol Hispanio. Do, la tiutempaj intelektuloj konsideris, ke la flamenka arto estis io apartenanta al la plej malsupraj sociaj klasoj.

Tamen, komence de la 20-a jarcento la flamenka arto altiris la atenton de muzikistoj kaj poetoj. Tiel, Federico García Lorca kaj Manuel de Falla organizis konkurson pri *cante jondo* (profunda kanto). Ambaŭ artistoj vidis la flamenkon, ne kiel scenan artan ĝenron, sed male kiel popolan folkloron. La celo de ĉi tiu unua konkurso estis favorigi la partoprenon ne de profesiaj kantistoj, sed de tiuj tute amatoraj, ĉar, laŭ la organizantoj, nur fore de la profesieco estis eble trovi la plej profundajn kaj purajn radikojn de la flamenko.

Atingis la unuan premion de tiu konkurso “*El Tenazas*” kaj Manuel Ortega, tiam nur 8-jaraĝa kaj kiu post kelkaj jaroj estus amase konata kiel *Manolo Caracol*. Kvankam vere, la konkurso ne estis ege sukcesa, ja oni altiris la atenton de la tiutempaj intelektuloj, la tiel nomata *generacio de la 27*, kiuj agnoskis la flamenkan arton kiel manifestadon de la popola kulturo.



Manolo Caracol, la plej granda flamenka kantisto dum la 20-a jarcento

Post la civila milito la flamenko intermiksiĝis en la scenejoj kun la koplo, kiu estus adoptita de la politika reĝimo kiel la plej grava kaj taŭga arta manifestacio por la tiutempa hispana popolo. En la jaro 1956

oni organizas en Kordovo la Nacian Konkurson pri *Cante Jondo* (Profunda Kantado) kaj nur du jaroj poste fondiĝas en Jerezo la Katedro pri Flamenkologio. Ankaŭ dum ĉi tiuj jaroj aperas la libro *Mundo y Formas del Cante Flamenco*, de la kordova poeto Ricardo Molina kaj la sevila flamenka kantisto Antonio Mairena. Sur ĉi tiu verko, biblio de la flamenko, oni rakontas la historion de ĉiuj flamenkaj kantoj kaj oni diferencas la grandajn kantojn, tiuj pure ciganaj, de la malgrandaj kantoj, kiuj estus nur andaluziaj kaj amerikaj folkloraj kantoj flamenkigitaj.

Dum la 8-jardeko aperas nova generacio de flamenkaj artistoj, influigitaj de kantistoj kiel *Camarón de la Isla* aŭ *Morente* kaj gitarludistoj kiel *Paco de Lucía*. Ĉi tiuj artistoj ankaŭ intersiĝis pri aliaj muzik-stiloj, kiel pop-muziko, rok-muziko, ĵazo... Do, aperis intermiksiĝo de la flamenko kun tiuj kaj aliaj stiloj, naskiĝis tiam la nova flamenko, kiu estas tute malsimila al tiu antikve pura flamenka kantado.

Flamenkaj Kanto-Stiloj

Puraj Kantoj

- *Caña*: la plej baza kaj pura el la flamenkaj kantoj, kelkaj esploristoj eĉ asertas, ke ĝi estas pra-flamenka kanto bazita sur antikva andaluzia kanto.
- *Carcelera*: kanto tradicie kantita de la malliberigitaj kaj preskaŭ ĉiam temanta pri justicaj aferoj.
- *Cantiñas*: vigla kanto kiu naskiĝis en la urbo Kadizo, temanta ĉiam pri festaj aferoj.
- *Debla*: Kanto sen gitar-akompanado. La nomo devenas de la kreinto de ĉi tiu kanto *Blas Barea*, do temas pri “kanto de Blas” aŭ “Debla”.

- *Martinete*: naskiĝis ĉi kanto en la ciganaj forĝejoj, la temo ĉiam estas malfeliĉaj okazintaĵoj kaj la ritmo monotona.
- *Saeta*: popola kanto kiu memorigas la suferojn de Jesuo Kristo dum liaj lastaj tagoj. Pro tio ĉiam oni kantas dum la paska ĵaŭdo aŭ vendredo okaze de religiaj paradoj.
- *Seguiriya*: primitiva flamenka kanto, temanta pri pasio, amo, malamo aŭ tragedio.
- *Tango*: kvankam ĉiu zono havas sian propran tangon (Kadizo, Triano, Jerezo, Malago, Badajozo...), temas ĉiam pri dancebla kanto kiu poste devenigis aliajn similajn stilojn en Ameriko.
- *Toná*: tre antikva kanto, ĝi estas la cigana adapto de antikva kastilia balad-kanto.
- *Tientos*: tre simila al tango, kvankam kun pli malrapida ritmo.
- *Polo*: bazita sur antikvaj andaluziaj danceblaj kantoj.
- *Liviana*: bazita sur la *seguiriya*, sed multe pli leĝera. Temas pri kamparana kanto sen gitar-akompanado.
- *Serrana*: tipa kanto de la Arunda Montaro, temas ankaŭ pri kamparana kanto.
- *Alegría*: naskiĝis ĉi tiu kanto-stilo en la kadiza zono, temas pri festa kaj plenĝoja kanto kie la dancado ĉefrolas.
- *Romeras*: similas al la kanto *alegrías*, tamen ĝi devenas el Sevilo.
- *Mirabras*: temas pri la lej spektakla kanto kun dancado en la flamenka arto, la ritmo estas gracia, vigla kaj ondumanta.
- *Caracoles*: bazita sur la kadiza *cantiña*, verdire la origino de ĉi tiu kanto estas la flamenkaj spektakloj okazigitaj en Madrido fine de la 19-a jarcento.
- *Alboreá*: devenita el kastilia kanto, malofte la flamenka kantisto ludas ĉi kanton fore el ciganaj nuptoj.
- *Petenera*: la tekstoj de ĉi tiu kanto ĉiam estas tristaj, melankoliaj kaj la ritmo tre malrapida.
- *Bulería*: tipa kanto el Jerezo, temas pri festema kaj plenĝoja kanto.

Fandangoj

- *Fandango*: kvankam ofte oni konsideras la fandangon kiel tipan flamenkan kanton, verdirte temas pri kastilia kanto-stilo kiun poste en Andaluzio oni flamenkigis. Temas pri kanto kaj dancado kie la kastanjetoj ludas specialan rolon.
- *Malagueña*: tipa malaga fandango.
- *Verdiales*: ĝi estas antikva kamparana fandango kun ritmo tre rapida kaj simplaj tekstoj.
- *Bandolá*: tre simila al la *verdiales*, sed kun ununura kantisto kaj sen muzika akompanado.
- *Jabera*: antikva malaga fandango.
- *Jabegote*: ankaŭ temas pri malaga fandango, sed ĉi-foje ludita de la maristoj.
- *Rondeña*: malaga fandango kantita en la Arunda Montaro.
- *Granaína*: tre simila al la malaga fandango, sed tipe granada.
- *Minera*: fandango kantita de la ministoj en La Unión (Murcio)
- *Cartagenera*: devenas de la malagaj fandangoj kantitaj de la almerianoj elmigrintaj en Kartagenon, ne temas pri ministaj aferoj.
- *Taranta*: naskiĝis en la areo Almerio-Murcio, ĝi estas la bazo de ĉiuj ministaj flamenkaj kantoj.
- *Tarantos*: tre simila al la *taranta*, sed kun dancada akompanado.

Aliaj kanto-stiloj

Temas pri miksaĵoj inter kantoj kun flamenka deveno kaj aliaj amerikaj kaj andaluziaj stiloj kiel la *bambera*, *campanilleros*, *colombiana*, *farruca*, *garrotín*, *guajira*, *mariana*, *milonga*, *nana*, *rumba*, *sevillanas*, *trillera*, *vidalita*, *villancico*, *zambra*...

La Dancado

La dancado, kune kun la kantado kaj la gitarludado, estas alia maniero esprimi la sentojn ene de la flamenka arto. Tamen, verdire, la dancist(in)o ludas la sentojn esprimatajn de la kantisto, pro tio ne ĉiuj kanto-stilojn estas eble danci.

Kiel esprimiloj la dancist(in)o posedas sian proprajn brakojn, pojnajn, manojn, la korpan balanciĝon, la rond-irojn kaj la pied-klakadon. Ĉiu kanto-stilo havas sian propran ritmon por la dancado kaj kvankam en la plej pura flamenko ekzistas reguloj por tiuj movoj, nuntempe ĉiaj reguloj estas tute forgesitaj kaj la dancist(in)o eblas esprimi sin per la movoj kaj kvietigoj de li/ŝi preferata. Tio okazas, ekzemple, ĝuste en la momento kiam la kantist(in)o ekdancas, ĉar li/ŝi rajtas elekti tiun momento, ekz. ĝuste antaŭ ekkanti, tuj post la unua verso de la kanto aŭ okaze de la falseto de la gitaro.

La plej superba momento estas la *escobilla*, temas pri la momento kiam la dancist(in)o ludas rapidan ritmon pere de pied-klakado. La dancado povas havi unu aŭ du el tiuj momentoj kaj okaze de la fino de la dancado la dancist(in)o eĉ plirapidigas la ritmon.

La Gitaro

La gitaro estas la plej populara muzik-instrumento ĉe la flamenka arto. Verdire, ĝis antaŭ kelkaj jaroj temis pri la sola instrumento kapabla akompani la kantiston, tamen lastatempe kaj ĉefe okaze de la apero de la “nova flamenko” oni ekuzis aliajn muzikilojn, kiel la pianon aŭ la muzik-skatolon.

Sed tradicie, la gitaro estas la vera flamenka muzik-instrumento. La flamenka gitaro estas pli malgranda ol la normala hispana gitaro, ankaŭ pli leĝera. Pro tio, ĝia sonoreco estas pli malgranda kaj tio evitas la kaŝigon de la kantista voĉo. La gitarludisto uzas malsimilajn teknikojn, la plej gravaj estas la *picado* (stakato), tio okazas kiam la ludisto

stakatas la kordon por sonorigi konkretan muzikan noton; kaj la *rasgueo* (pinĉado), kiam tri aŭ kvar fingroj de la gitar-ludisto pinĉas kelkajn kordojn.

En esperanto?

Ni vidis kiam naskiĝis la flamenka arto, kiamaniere la kantisto ludas en la scenejo, sed ĉu povas ekzisti ia rilato inter flamenko kaj esperanto? Jes, sendube” Kaj flamenko kaj esperanto estas esprimiloj kapablaj superi kian ajn landlimon, ne ekzistas bariloj kapablaj haltigi la esprimo-povon de la homo kaj nian kapablon dissendi tion kion ni sentas, ĉar ambaŭ aferoj estas internacie kompreneblaj. Se oni nin demandas kion vi sentas kiam vi ĉeestas flamenkan spektaklon aŭ kion vi sentas kiam vi uzas internacian lingvon, plejeble la respondo estos simila. Flamenco estas la maniero pere de kiu la animo esprimiĝas kaj tio povas okazi ankaŭ en esperanto. Ne temas nur pri ĝojoj aŭ feliĉoj, ankaŭ pri tristoj, seniluziigoj, misfortunoj, ĉio povas esti esprimata, la afero estas nur trovi la plej taŭgan esprimilon, pro tio flamenko kaj esperanto povas ekzisti rilaton inter la flamenko kiel kulturaĵo kaj esperanto kiel lingvo.



I-a Konferenco pri instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la mondo.

Instruado estas sendube la plej grava aktivaĵo por la disvolvo de la internacia lingvo. En tiu ĉi klaso de lingvo, en kiu la nombro da denaskaj parolantaj estas tre malalta, estontaj parolantoj devas lerni la lingvon, kaj en tiu procezo la maniero instrui kaj la kvalito de la instruantoj aŭ aliaj rimedoj fariĝas gravega por la kompletigo de la esperantistiĝo. Krome, en la lastaj jaroj la ŝanĝoj en la socio kaj la tekniko, kaj specife la ĝeneraligo de la reto, multe modifis la manieron kiel la novaj esperantistoj alprenas la lingvon.

Dum la Konferenco ni pritraktos diversajn flankojn de la instruado de Esperanto. Okazos prelegoj, interŝanĝoj de spertoj, iniciatoj por kunordigi agadojn. Oni montros ankaŭ praktikajn ekzemplojn, pere de la instruado al komencantoj el la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj kaj al partoprenantoj de la Kongreso.

Dum tiuj tagoj eblos trapasi oficialan ekzamenon de Esperanto akorde kun la nova internacia ekzamensistemo de Esperanto, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo, kaj difinas lingvokonajn normojn. Oni povas fari nur parolan aŭ skriban parton aŭ ambaŭ, kaj ankaŭ eblos elekti diversajn nivelojn.

Speciala gasto de la Konferenco estos Katalin Kovats, respondeculo de la retprojekto edukado.net, sperta en la instruado de Esperanto, kaj prizorganto de la internacia sistemo de ekzamenoj.

Celo de la Konferenco estos la firmigo de la organizado de la reto de instruistoj de Esperanto en Hispanio. Oni planas rekrei la iaman fakon de instruado sine de la Hispana Esperanto-Federacio, delonge nefunkciantan, kaj formi hispanan oficialan sektion de la Internacia

Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu estas la ĉefa kolektiĝejo por instruistoj kaj edukistoj de Esperanto.

La Konferenco studos strategiojn por alproksimigi Esperanton al lernejoj kaj universitatoj. Dum ĝi oni planas prezenti la lingvon al grupoj de mezlernejoj, kiel unua paŝo de tiu strategio.

La fokusiĝo en la instruado de Esperanto fariĝos ankaŭ omaĝo al la figuro de Juan Régulo Pérez, la unua oficiala profesoro de Esperanto en hispana Universitato (kaj samtempe unu el la plej gravaj eldonistoj de literaturo en la internacia lingvo), la centan datrevenon de kies naskiĝo ni celebras dum tiu ĉi jaro.

Ekzameno de esperanto kun oficiala agnosko

Sabate la 3-a de majo okazos oficiala ekzameno laŭ la reguloj de UEA-KER. Kio estas tio?

En decembro 2008 Universala Esperanto-Asocio lanĉis novan internacian ekzaminsistemon de esperanto, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo kaj difinas lingvokonajn normojn. La Konsilio de Eŭropo regulis la valoron de la diplomoj atingitaj okaze de la lingvo-instruado, antaŭtempe oni parolis pri malsamaj niveloj... elementa, meza, perfektiga, do la Konsilio de Eŭropo pere de la dokumento celis unuigi la valorojn de tiuj diplomoj laŭ striktaj reguloj.

Naskiĝis tiam la Komuna referenckadro. En esperantio, la Universitato de Budapeŝto, kunlabore kun UEA, organizas sesiojn tra la tuta mondo por la atingo de tiuj diplomoj, ĉi tiel la instanco certiganta la konon de esperanto ne estas privata asocio, sed tute oficiala.

La novaj ekzamenoj de UEA laŭ la komuna eŭropa referenckadro KER nun estas ellaboritaj en niveloj B1 B2 kaj C1, la referenckadro pravas 6 nivelojn, de la plej baza A1 ĝis la tute altnivela C2, sed la

Universitato de Budapeŝto nur certigas el la nivelo B1 ĝis C1. La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la ŝtata lingvoekzamena centro en Budapeŝto kie esperanto troviĝas inter la ŝtate rekonataj fremdaj lingvoj kaj kadre de ties ekzamensistemo havas la samajn rajtojn kiel la aliaj fremdaj lingvoj.

La nova ekzamensistemo estis lanĉita fine de 2008 kaj ĝis la fino de 2013 okazis entute 37 sesioj en 30 landoj kun 1346 ekzamenokazoj. La partoprenintoj venis el 61 landoj kaj entute estis disdonitaj 1250 atestiloj. En Arundo okazos ekzamenoj de la niveloj B1, B2 kaj C1.

La programeroj de ĉi tiu konferenco aperas sur la programo kun la simbolo:



ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Eksterordinara Ĝenerala Kunsido Alvoko al ĉiuj membroj de la Asocio

Kiel Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo / Asociación Andaluza de Esperanto, mi kunvokas ĉiujn membrojn cele ilian ĉeeston en la Eksterordinara Ĝenerala Kunsido de la Asocio, okazonta la venontan 4-an de majo 2014-a ĉe la Urbodoma Kongresejo en la urbo Ronda (Málaga), sub la jena tagordo:

- 1) Legado kaj aprobo, se oportune, de la protokolo de la pasinta kunsido.
- 2) Elekto kaj nomumo de la nova estraro de la asocio por la jaroj 2014 – 2016.
- 3) Kursoj de esperanto, ĉeestaj kaj retaj.
- 4) Konto-stato.
- 5) Buĝeto de enspezoj kaj elspezoj por la jaro 2014.
- 6) Demandoj kaj petoj.

Malago, la 11-a de aprilo 2014-a.

La Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Subs. Ángel Arquillos López

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

ALIGINTOJ AL LA 73-a Hispana kaj 18-a Andaluzia Kongresoj de Esperanto

ĝis la 27-a de aprilo 2014

- 1.- Ángel Arquillos López (Málaga)
- 2.- José María Rodríguez Hernández (Córdoba)
- 3.- María Dolores Torres Mateos (Málaga)
- 4.- Juan Diego Díaz Bautista (Ronda)
- 5.- Fátima Jiménez García (Ronda)
- 6.- Carlos Spinola (Málaga)
- 7.- David Rodríguez (Málaga)
- 8.- Carmen San Segundo (Málaga)
- 9.- Angelita Sanz Mayor (Madrid)
- 10.- Francisco Conejero Sánchez (Castellón)
- 11.- Inés Comabella Aguiló (Castellón)
- 12.- José Añó Belda (Valencia)
- 13.- Margarita Peña Castellano (Valencia)
- 14.- Lorenzo Noguero Sarasa (Zaragoza)
- 15.- Eunice Alberto Moysés (Zaragoza)
- 16.- M^a Josefa Bautista Jurado (Ronda)
- 17.- Diego Díaz Berlanga (Ronda)
- 18.- José María González Spinola (Sevilla)
- 19.- Ángel Mañero González (Valencia)
- 20.- Félix Manuel Jiménez Lobo (Madrid)
- 21.- María Belén Romero Márquez (Málaga)
- 22.- Juan García del Río (Málaga)
- 23.- Viktoro Solé (Barcelona)
- 24.- Luis E. Hernández García (Valladolid)
- 25.- Rafaela Urueña de Hernández (Valladolid)
- 26.- Matilde Montero Sánchez (Madrid)
- 27.- Rosa López Martín (Tarrasa)
- 28.- Enrique Navarro Rubio (Zaragoza)
- 29.- Ángel García Gutiérrez (Santander)
- 30.- Irina Grigorieva (Santander)
- 31.- Jesús Miguel García Iturrioz, Portugaleta (Vaskio)

- 32.- Guadalupe Casilla Mimbrero, Galdakao (Vaskio)
- 33.- Raúl Martínez Anguita (Ciudad Real)
- 34.- Luis Serrano Pérez (Sabadell)
- 35.- M. Iciar Arteche Urrutia, Bilbao (Bizkaia)
- 36.- Lupe Sanz Bueno (Madrid)
- 37.- Florencio Serrano Gil (Roda de Bará) (Tarragona)
- 38.- Miguel Gutiérrez Adúriz (Santander)
- 39.- Miguel Fernández (Madrid)
- 40.- José Antonio del Barrio (Madrid)
- 41.- Hubert De Meyere (Belgio)
- 42.- Michèle Villers (Belgio)
- 43.- Francisco Javier Moleón García (Belgio)
- 44.- Francisco López (Bilbao)
- 45.- Ana María Manero (Madrid)
- 46.- Manuel Parra (Madrid)
- 47.- Ewa Grochowska (Francio)
- 48.- Alex Mattew Stefanelli (La Carolina) (Jaén) & Usono
- 49.- Ángel Robles Matas (Málaga)
- 50.- Maria Luisa Espósito Martos (Málaga)
- 51.- Olga Markova (Germanio)
- 52.- Abel Montagut (Lleida)
- 53.- Montserrat Martí (Lleida)
- 54.- Juan Antonio Torres Galán (Sevilla)
- 55.- Daniel Rocher Camps (Gandía) (Valencia) (J)
- 56.- Francisco Javier Guerras Sabio (San Fernando) (Cádiz)
- 57.- Carmen Suárez Fernández (Madrid)
- 58.- Raúl Salinas Monteagudo (Valencia)
- 59.- Ricardo Biurrún González (Madrid)
- 60.- José Salguero (Don Benito)
- 61.- Carmen Cidoncha (Don Benito)
- 62.- Juan Trenado Serrano (Madrid)
- 63.- Katja Kapitonova (Madrid)
- 64.- Lucía Orozco Jiménez (Ronda) (J)
- 65.- Javier Alcalde (Barcelona)
- 66.- Saioa Escobar (Barcelona)
- 67.- Pedro Ullate (Muriedas) (Cantabria)
- 68.- Alberto Corral (Santander) (Cantabria)
- 69.- Rosa del Mar Santiago (Obregón) (Cantabria)
- 70.- Pablo González (Santander) (Cantabria)

- 71.- Rikardo Felipe Albert Reyna (Madrid)
- 72.- Antonio Fabián Jiménez (Vélez Málaga)
- 73.- Alicia Dyjach (Francio)
- 74.- Águeda Biurrun (Madrid)
- 75.- Eduardo Berdor (Zaragoza)
- 76.- María Dolores Rivero Maqueda (Ronda)
- 77.- Pablo Carrascal (Córdoba) (J)
- 78.- Enric Baltasar (Oliva) (Valencio) (J)
- 79.- Cristina Pérez Baeza (Córdoba)
- 80.- Jesús Rodríguez Pérez (Córdoba) (J)
- 81.- Ángel Rodríguez Pérez (Córdoba) (J)
- 82.- Juan Diego Leal Lobato (Ronda) (J)
- 83.- Lucía González Gallego (Ronda) (J)
- 84.- Sabino Pelegrín Colomo (Ejea de los Caballeros) (Aragón)
- 85.- Daniel Egido Álvarez (Madrid) (J)
- 86.- Jaime Vinielles de Pereda (Madrid)
- 87.- Rafael Mateos González (Huelva)
- 88.- Charlotte Beller-Guenther (Germanio)
- 89.- D-ro Wolfgang Guenther (Germanio)
- 90.- María Isabel Martínez Moral (Collado Villalba) (Madrid)
- 91.- Pedro Sanz Sanz (Collado Villalba) (Madrid)
- 92.- Andrea Sanz Martínez (Collado Villalba) (Madrid) (J)
- 93.- Jorge Sanz Martínez (Collado Villalba) (Madrid) (J)
- 94.- Isabel Sancho (Barcelona)
- 95.- Gabriel Cerdá (Barcelona)
- 96.- Marketa Wilkus (Pollando)
- 97.- Martí Gustamante (Barcelona) (J)
- 98.- Francesc Inglada (Tarragona)
- 99.- Sol Roca (Tarragona)
- 100.- José Luis Torres Alemany (Cerdanyola del Vallès) (Barcelona) (J)
- 101.- Eduardo Larrouy López (Bilbao)
- 102.- Nazareth Blázquez Jiménez (Ronda) (J)
- 103.- Mounir Abjiou (Maroko) (J)
- 104.- Marcos Ibáñez Gordillo (Sevilla) (J)
- 105.- Aníbal Ibáñez Gordillo (Sevilla) (J)
- 106.- Concepción Fernández Domenech (Málaga)
- 107.- Fatiha Menouer épouse Dahmani (Algerio)
- 108.- Ángela Mena Ramírez (Ronda) (J)

- 109.-Alejandra Alba Tirado (Ronda) (J)
- 110.-Lucía Amorós Gil (Córdoba) (J)
- 111.-Ahmed Mansour (Maroko)
- 112.-Yasmin Maghnie Berasategi (O Carballiño-Ourense)
- 113.-David González Gandara (Ourense)
- 114.-José Francisco Chicharro Cazallas (Valencia)
- 115.-Pedro Vilarroig (Madrid)
- 116.-Pedro Pérez Ruis (Málaga)
- 117.-Laura Carballo Rojas (Madrid)
- 118.-Iván García Cortijo ()
- 119.-Dorota Parzyszek (Tunizio)
- 120.-Moncef Ben Jaafar (Tunizio)
- 121.-Adam Ben Jaafar (Tunizio) (J)
- 122.-Kruszyk Anna (Pollando)
- 123.-Manuel Pancorbo (Galapagar, Madrid)
- 124.-Alejandro Escobedo (Madrid) (J)
- 125.-Katalin Kovats (Hungario)
- 126.-Jean-Marc Leclercq (Francio)
- 127.-Andrea Bertrand (Francio)
- 128.-Pierre Libbrecht (Francio)
- 129.-Thierry Saladin (Francio)
- 130.-João José Santos (Portugalia)
- 131.-Idir Expósito Gómez Tegueste (Tenerife) (J)
- 132.-Juan Vicente Mengual Narváez (Oliva, Valencia) (J)
- 133.-Vincent Gerbe (Francio)
- 134.-José Francisco Platas (Madrid)
- 135.-Francisca Jiménez Valenzuela (Madrid)
- 136.-Indalecio Sèura (Granada)
- 137.-Kristjan Moreno Comino (Granada)
- 138.-Fernando Nieto García (Granado)
- 139.-José Carlos Cuevas Albaladejo (Madrid)

(J) = Senpaga aliĝinto naskiĝinta post la 31/12/1989

Notoj



Notoj



